

Gaja Planedo

Numero 1 (2011:1)

Trimonata cifereca revuo de la ekologia grupo "Kubaj Naturamantoj"
(**KoNoA**)



Klimata ŝanĝiĝo

Bonvenon, karaj legantoj

La 15an de Decembro naskiĝis la kreinto de Esperanto. Ĉiujare tra la mondo, esperantistoj aranĝas ion memore al nia majstro. Tiu ĉi revuo estas nia donaco por li. La unua revuo de "Kubaj Naturamantoj". Esperanto signifas egalecon kaj ni bezonas tion por plibonigi la mondon kaj protekti la naturon.

La ĉefa temo de la revuo estas la klimata ŝanĝiĝo kaj kiel ĝi kontribuas plimultigi la oftecon de la meteologiaj fenomenoj. Kompreneble se la klimato ŝanĝas, ankaŭ ni devas ŝanĝi kaj en la rubriko "Tempo por memhelpado" ni volas helpi vin pere de konsiloj pri kiel vivi pli bone. Ĉu vi pensis en la rilatoj ekzistantaj inter la interna kaj la ekstera medioj. Kelfoje ni limigas la medion dirante ke ĝi estas la plantoj, la bestoj, la akvo, la aero; tio estas la naturaj rimedoj.

Ĉu la homoj, institucioj, stato, religio ne estas partoj de la ekstera medio? Ankaŭ ili povas esti malpurigitaj.

Multe oni diras pri la klimata ŝanĝiĝo, senarbarigo, tutmonda varmiĝo, tamen ne multe oni diras pri la malpurigado de la homaj pensmanieroj kaj pri la bezono ŝanĝi nin mem por ke la mondo ŝanĝiĝu. Ekzemplo de tio estas kio okazas ĉiujare en Danio. Estas terurege. Ĉu ne?

Ni devas pensi pri la estonteco de la tuta homaro, ne nur pri niaj ideoj kaj planoj. Do, ni unuiĝu por realigi plibonan mondon ĉar estas homoj kiu kredas ke ĝi eblas.

Se iu pensas kiel mi, bonvolu kontakti min.

Agrablan legadon kaj Feliĉan Novjaron.

La redaktorino.

TEAMO

Redaktorino kaj desegnistino:
Ismayr Lezcano García.

Kunlaborantoj:
Yordán Fonseca Olivera.
Fabianny Montano Sanamé.

Korektistoj:
Julián Hernández Angulo.
Fernando Paredes Elosegui.
Pedro Fernández Rodríguez.
Geomar Martínez Pérez.

ENHAVO

Ĉeftemo.

La klimata ŝanĝiĝo..... 3- 4 -5

Por ke vi pripensu.

La maro ruĝiĝas.....6

Lernu pri ekologio.

Kio estas ekologio?..... 7

Kuriozaĵoj.

La specimenoj de la estonto aperas en "malgrandan ujon".

Horo por la tero..... 8

Tempo por memhelpado.

Povo de pozitiva pensado.....9

Plantoj por nia sano.

Romeriĵo.....10

Ĉio pri KoNoA.

Inaŭguro kaj aranĝoj.....11

Gravaj Datoj.

Okt-Nov-Dec.....12

Ekologia Kuirarto.

Torto ananaso printempa.....13

Finaj Vortoj14 y 15

Ĉefa temo

La klimata ŝanĝiĝo estas procezo science elpruvita kiu engaĝigas la tutan planedon ekde la Industria Revolucio. Inter ĝiaj rezultoj estas la tutmonda varmiĝo kaj la plialtigo de la marnivelo. Tio ŝanĝas grandmaniere la medion kaj endanĝerigas la memsufiĉan disvolvigon. Por malpligii ĝiajn rezultojn ni devas prepariĝi kun sufiĉa tempo. Tial oni verkis tiun ĉi artikolon.

Ekde la pasinta jardeko ekzistas ŝanĝoj en la klimato de nia planedo kiuj montras ke nun ni vivas ŝanĝa epoko. La plialtigo de la jara temperaturo, la fandado de polusa glaciaĵoj, ekstremaj ŝanĝoj en la pluvoj kaŭzas ke la niveloj de oceanoj kaj maro plialtiĝos, tiam insuloj kaj kontinentaj marbordoj subakviĝos. Tiaj ŝanĝoj povus kaŭzi estontece novajn klimatojn en kelkaj regionoj de la terглоbo, perturbon en la ekologia sistemo kaj al ĉiuj estaĵojn tie vivantaj. La tutmonda varmiĝo plialtiĝas dum milionoj da jaroj, sed la procezo plimultigas kun ritmo neniam antaŭe vidita en la terhistorio. Sciencistoj opinias ke en la venontaj 100 jaroj la temperaturo daŭrigos ĝia plialtigo inter 2 kaj 5 gradoj kaj la maroj leviĝos ĝis 1 metro. Ĉi tiuj ŝanĝoj povas esti kaŭzita de eksteraj fortoj kaj homagado.

La klimata ŝanĝiĝo jam komenciĝis kaj kompreneble ĝi kontribuos plimultigi la oftecon de la metereologiaj fenomenoj. Tial nia bona rilato kun la naturo devas esti nia unua celo. Oni evitu la teruran katastrofon kiu baldaŭ povos okazi se oni daŭrigas kun la granda konsumo kaj la aktuala vivstilo kies efikojn jam ni suferas. La lastaj jaroj klare montras en diversaj mondpartoj la homajn kaj ekonomiajn perdojn pro la naturaj katastrofoj. Milionoj da personoj mortas pro uraganoj, tertremoj, inundoj ktp kaj tiu ĉi situacio devas finiĝi.

Kio estas la klimata ŝanĝiĝo ?

La klimata ŝanĝiĝo estas la plialtigo de la temperaturo, transformiĝo en la sistemoj de pluvad- kaj malpluvemaj sezonoj, neregulaj kaj kreskanta okazigo de klimataj fenomenoj kaŭzita pro la homagado.

Kio estas la klimata varieceo ?

Estas jaroj kun multaj varmeco kaj aliaj kun multega malvarmeco, estas ankaŭ jaroj kiuj pluvetas kaj la aliaj kiuj pluvegas. La kialoj estas diversaj kiel ekzemplo la fenomenoj de “ La knabo kaj la knabino “.

Estas gravege ne miskompreni ambaŭ konceptojn.


Klimata ŝanĝiĝo

Malrapida procezo kiu okazas
pro la homagado.

Klimata varieco

Ĉiam okazadis ĉar estas
propra trajto de la surtera klimato
sendepende de la homagado.

Oni konsideras ke dum la lastaj jaroj la klimata varieco estis refortigita pro la klimata ŝanĝiĝo.



La supra bildo montras jarajn oscilojn de la meza marnivelo (blukolora) determinita pro la klimata varieco kaj la tendenco al la progressa altigo (ruĝkolora) pro la klimata ŝanĝiĝo.

La scienca opinio de klimatsanĝiĝo, kiel esprimita de Interregistara Komitato de la UN pri Klimata Ŝanĝiĝo kaj specife subtenata de la naciaj sciencaj akademioj, estas ke la averaĝa tutmonda temperaturo estas altiĝita 0.6 ± 0.2 °C de la frua 20-a jarcento, kaj plej "multe el la varmiĝo observata dum la lastaj 50 jaroj estas atribuebla al homaj agadoj". Malgranda malplimulto da kvalifikitaj sciencistoj kontestas la vidpunkton, ke la agoj de homaro grave rolas en la lastatempa temperaturo-ŝanĝo. Malcertaĵoj ekzistas pri kiom da klimatsanĝo oni observos en la estonteco. Konflikta kaj publika debato ekzistas pri kion fari (se ion) pro tutmonda varmiĝo. Pri la aktualaj marfluoj, de kiuj tre dependas multaj regionaj klimatoj, estas neniu certeco ke ili ne estas jam eksanĝiĝantaj kaj trajektorie kaj temperature.

Paŝoj por la malpliigo de la klimata ŝanĝiĝo.

Luktu kontraŭ la senarbarigo.

Recikligu la rubaĵojn.

Ŝparu akvon kaj energion.

Ne konstruu apudmare.

Evitu la erozion.

Malpliigu la malpurigadon.

Uzu alternativajn fontojn de trinkebla akvo.

Semu aŭ plantu kreskaĵojn rezistaj al la sekiĝo. (Kiel la tre konata inter ni: Moringa)

Protektu la ĉirkaŭaĵon.

Serĉu la konsilojn de spertuloj.

Pliaj informoj:

Interregistara Spertularo pri Klimata Ŝanĝiĝo aŭ **ISKŜ** estas scienca organizaĵo taskita pri la taksado de la riskoj de la klimatsanĝiĝo, kaŭzita de la homaro. Ĝi estis kreita en 1988 de du asocioj de la Unuiĝintaj Nacioj: la Programo de Unuiĝintaj Nacioj pri Mediprotektado kaj la Monda Organizaĵo pri Metereologio. La ĉefa tasko de la spertuloj estas taksati la riskojn de la klimatoŝanĝo kaj kolekti strategiojn por malhelpi ĝin. La sidejo de ISKŜ troviĝas en Ĝenevo.

En 2007 la organizaĵo, kune kun la eksa usona vicprezidento, Al Gore, ricevis la Nobel-premion pri paco.

La ISKŜ publikigas periodajn informojn, kiuj povas taŭgi kiel apogo por la agado de la landoj, kiuj subskribis la traktatojn de Unuiĝintaj Nacioj pri la klimatsanĝiĝo. Tiuj informoj estas baze konsiderataj kiel la plej fidindaj pri tiu temo, kaj estas ofte citataj en la politikaj kaj sociaj diskutoj pri tiu ĉi afero. Ekzistas ankaŭ resumaj informoj, kiu ĝenerale vekas atenton de amaskomunikiloj pro iliaj praktikaj konsideroj.

Por fini ne temas protekti la medion pro konservema idealo, sed oni devas garantii la naturajn sistemojn kaj la survivon de nia speco. Bonvolu, ni ĉiuj devas eviti la alproksimiĝantan ekologian katastrofon. La TERO bezonas vian helpon.

Noto: Tiu ĉi artikolon estis elĉerpita de la broŝuro “ Protege a tu familia de ... las consecuencias del cambio climático.(Protektu vian familio de...la rezultoj de la klimata ŝanĝiĝo) verkita de Manuel A. Iturralde Vinent. Ankaŭ estas vikipediaj partoj; opinioj kaj tradukoj de la redaktorino.

Por ke vi pripensu



La maro ruĝiĝas.

Ĉiujare en la insulo Feroe, en Danio oni organizas aranĝon kie oni masakras centoj da inteligentegajn delfenojn nomitajn “Calderones”. Tiun ĉi aranĝon ĉefe partoprenas junuloj kiel rito por pruvi ke ili jam estas plenaĝaj. Tiu ĉiu delfenoj kiel ĉiuj delfenoj estas tre pacemaj, ili nur ludas kaj interagas kun la homoj kiel amikeca gesto. Nekredeble la homoj mortigas ilin aŭ partoprenas kiel rigardantoj kaj apogante tiu ĉi grandan kruelecon.

La delfenoj ne mortas tuj, la junuloj pere de akraj hokoj enigas ilin mulfoje. Kiam tio okazas la delfenoj emicias iuspecan krion kvazaŭ beban ploron dum ili sensangiĝas malrapide kaj mortiĝas en sia propra sango.

Tiu ĉi temo estas tre delikata ĉar povas esti ke ni vidas tion kun granda ŝoko kaj tamen ni poste forgesas...

Se tio igas vin pripensi ke ni mortigas unu la aliajn, ne gravas kial ni faris tion: ĉu por amuziĝo ĉu por bezono, kaj kredas ke ni devas fari ion por haltigi la detruo kiu ni mem provokas kun niaj propraj manoj, skribu nin, ni volas scii kion vi pensas.

Fonto: Lail-alsahara.com

Elhispanigita de Ismary.



Lernu pri EKOLOGIO



Ekologio estas la scienco, kiu studas la vivantajn estaĵojn en ilia medio kaj la rilatojn inter ili. La termino ekologio venas de la greka oikos (domo, loĝejo) kaj logos (parolo, scienco) ĝi montras la sciencon de la loĝejo. La vorton inventis en 1866 Ernst Haeckel, germana biologo pordarvinisma. En lia verko «ĝenerala morfologio de organismoj», li indikas per tiu termino « la sciencon de la organismrilatoj kun la ĉirkaŭa mondo, t. e. en larĝa senso, la scienco de ekzistkondiĉoj». Difino kutime agnoskita, aparte en homa ekologio, difinas ekologion kiel triangula rilato inter la uloj de iu specio, la organizita aktivado de tiu specio kaj la de tiu aktivado. La medio estas kaj la produktitaĵo kaj la kondiĉo de tiu aktivado, kaj konsekvence de la vivteno de la specio. Ekologo estas fakulo pri ekologio, kiun oni ne konfuzu kun ekologiisto.

La inciatintoj de ekologio

Unu el la unuaj ekologoj povus esti Aristotelo, kiu interesiĝis pri multaj bestoj. Lin sekvis multaj naturasciencistoj, kiel Linnaeus aŭ Buffon, kies laborojn oni kelkfoje agnoskas kiel premisoj de moderna ekologio.

La botanika geografio kaj Alexander von Humboldt

En la 18a kaj komence de la 19a jarcento, la grandaj marpotencaj landoj, kiel Francio aŭ Germanio faris multajn ekspediciojn por esplori la mondon, disvolvi la transmaran komercon kun aliaj landoj, malkovri novajn naturajn resursojn kaj inventari ilin. Komence de la 18a jarcento ĉirkaŭ 20 000 specioj estis konataj, kontraŭ 40 000 komence de la 19a kaj preskaŭ 400 000 hodiaŭ. Multaj sciencistoj kaj precipe botanikistoj partoprenis tiujn ekspediciojn, kiel la germana esploristo Alexander Von Humboldt, kiu oni ofte taksas vera ekologiiniciatinto. Li estis la unua esploranta la rilatojn inter medio kaj organismoj. Li klarigis la rilatojn inter vegetaĵaj specioj kaj klimatoj, priskribis la vegetaĵarzonecon kun la alteco aŭ la latitudo, kion oni nomis plantogeografio. En 1804 ekzemple, li raportas imponan kvanton da specioj, aparte vegetaĵoj, kies geografian dispartigadon li serĉe eksplikas apogiĝante sur la geologiaj donitaĵoj. Fama verko de Humboldt estas «Eseo pri la geografio de plantoj» (1805). Aliaj gravaj botanikistoj estas ekzemple Aimé Bonpland, kiu partoprenis la ekspedeciojn de Humboldt aŭ Eugenius Warning.

Fonto: Vikipedio.

Daŭrigota...



KURIOZAJXOJ



La specimenoj de la estonto aperas en “malgrandan ujon”.



Ĵusa studo montras ke pro la klimata ŝanĝiĝo la bestoj kaj la plantoj malgrandiĝas. Tio estas rekta rezulto de la temperatura plialtigo kaj la akva malabundeco.

Ĉiu plia grado povas redukti inter 3 kaj 17 procento la grandecon de plantoj, inter 0,5 y 4 procento la korpon de marestaĵoj kaj inter 6 kaj 22 tiun de la fiŝoj.

Elŝerpita de: Jurnaloo “Juventud Rebelde”.

Artikolo de Patricia Cáceres.

Tradukis: Ismary

Horo por la tero

La **horo por la tero** estas internacia evento, kiu petas la homojn mallumigi siajn domojn kaj firmaojn kaj ne uzi malbezonaĵajn elektraĵajn aparatojn. En 2009 la *horo por la tero* okazis internacie, sabate la 28-an de marto, je la 20:30 ĝis la 21:30 horo (lokatempe), dum en 2008 la *horo por la tero* okazis internacie, la 29-an de marto, je la 20:00 ĝis la 21:00 horo (lokatempe). En 2007 okazis la unua horo por la tero en Sidnejo, Australio.

Elŝerpita de: Vikipedio.

Tempo por MEMHELPADO

Povo de pozitiva pensado.

“ Pensoj iras trans limo sen pago kaj timo ”. Tion oni ne diras sen kaŭzo. Pensoj havas la kapablon direkti nian vivon. Se iu ĉiam ripetas al si “mi estas malsana”, “ mi estas malforta”, “ neni ŝatas min” ekzistas granda ebleco, ke tiu vere malsaniĝu, malfortiĝu... Tial al siaj parencoj aŭ amikoj, aparte al infanoj, oni neniam diru frapajn aŭ negativajn vortojn, kiel “mallaboremulo”, “eta mensogulo” kaj simile, eĉ ne dum ridado, ĉar tio povus kapti iun por la tuta vivo. Multaj homoj verŝajne sanaj havas senton de malgranda valoro simple pro tio, ke iliaj gepatroj ofte diris al ili dum la infaneco, ke ili estas malkapablaj fari tion ĉi, ke ili neniam sukcesos tion alian.

Pens-maniero estas eble plej malfacile komprenebla kaj kaŝa marko de nia karaktero, kaj ĝi fakte ekestas jam de la naskiĝo sub la ago de diversaj kaŭzoj: edukado, ĉirkaŭaĵo, personaj, interesoj, instruado... Estas multaj la homoj, kiuj havas negativajn bildojn pri la vivo, kiuj akceptis la negativan pens-maniero, kiel oni nomas ĝin. Tia homo plej ofte tute ne rimarkas, kiom da negativaj pensoj li direktas al si kaj kiajn sekvojn tio povus porti al lia sano. Ni bone scias, ke la plej malfacilaj malsanoj, laŭregule, kaptas malfeliĉajn kaj malkontentajn homojn. Simile, la pozitivaj pensoj ankaŭ havas povon kaj forton por pozitive influi sur nia vivo. Neniam diru al vi, ke vi estas malbela, seninteresa, malkapabla. Ellernu mem direkti al vi pozitivajn pensojn, kiuj donos forton por agi sen timi. Ne atendu, ke alia venu al vi por diri, ke via vivo valoras kaj estas interesa.

Elektu iun universalan temon, ekzemple amo, feliĉo, boneco, justeco kaj pripensu ĝin ĉiun nokton antaŭ ol endormiĝi. Tiam via konscio estas preta por akceptado de novaj enhavoj. Vi povas tralegi, kion diris –ekzemple pri amo- grandaj, elstaraj verkistoj, filozofoj, humanistoj. Tio ĉi povus helpi por ke la ideoj pro boneco kaj altaj personaj ecoj estru je vi kaj ili estu konstrua parto de via vivo.

Tradukis kaj adaptis Zoran Ciric, Serbio.

Fonto: Revuo Kontakto 136 (1993:4)

Plantoj por nia sano

Romerijo

Scienca nomo: Bidens Alba

Vulgarnomo: Romerijo

Utila parto: La tutan planton



Altigas la produktado de galo kaj estas:


- Kontraulcera
- Fungicida
- Baktericida

* Oni uzas tiun medikamenton kiel siropo kaj tinkturo.

* Oni aplikas ĝin topike kaj perbuse.

* Oni uzas la foliojn, la florojn kaj la tigojn en infuzaĵon. Oni eltrinkas unu tason da infuzaĵon ĉian 4 horojn se la doloro estas akuta. Oni devas filtri ĝin tra ŝtofo.

Fabianny Montano. Tradukis Pedro Fdez Pérez



Ĉio pri KoNoA

La 11an de Septembro ĉirkaŭ 30 geesperantistoj el Havano kunsidis en la Botanika Ĝardeno, belega loko oficiale inaŭgurita la 20an de Oktobro 1989. Tie ni fondis Ekologian Grupon celante subteni naturprotektadon kaj disvastigi Esperanton en aliaj ekologiaj grupoj de nia lando. Ankaŭ plialtigi la lingvonivelon de la membroj kaj krei ekologian konsciencon en la esperantistaro. La nomo de la grupo estas “Kubaj Naturamantoj” (KoNoA). Ĝi estas gvidata de Regla Piedra kaj Ismary Lezcano. Tiu estis bona momento por vidi vivajn plantajn kolektojn en naturaj pejzaĝoj kaj al ni tre plaĉis la kolektoj el diversaj mondregionoj. Poste ni manĝis en Vegetarana Restoracio.

Ni faris nian unuan kunsidon la 25an de Septembro por plani konkretan laboron kaj ni decidis kunlabori kun la ekologia grupo “Ando Reforestado”. La 5an de Oktobro ni partoprenis en interesa konversacio pri la Moringa Oleifera, grava planto kiu estas tre rezista al la sekiĝo; poste la 14an de tiu monato ni iris al la lernejo “Francisca Navia Cuadrado” de la Municipo Cerro por paroli al la gelernatoj pri Esperanto kaj Recikligado, de tiu rekontiĝo naskiĝis la ideo desegni por fari ekspozicion pri la temo. La infanoj lernis kelkaj vortojn en la internacia lingvo kaj povas esti ke en la jaro 2012 ni preparos kurson por ili. En la Nacia Sidejo de KEA estas Ekologia Angulo por montri ekologiajn artikolojn kaj kie ni faris ekspozicion pro la Internacia Tago de la malpliigo de naturaj katastrofoj kiu estis la 12an de Oktobro.

La 19an de Novembro ni partoprenis en la Ekologia Festivalo LOVE IN farita en la Tropikaj Ĝardenoj (Jardines de la Tropical) tie ni disvastigis Esperanton kaj kontaktis kun aliaj ekologiaj grupoj por kunlabori kun ili. La tre konata esperantistino Ana Montesinos el Britio interesiĝis pri Ekologio kaj ŝi parolis kun kelkaj membroj de nia grupo en agrabla rekontiĝo.

En la Unua Arta Konkurso kaj Festivalo Havana Filiko okazinta la 26an kaj 27an de Novembro en la Kulturdomo “Raúl Gómez García” de la Municipo 10 de Oktobro ni plantis 3 arbojn: mandarino, ĉerizo, kaj la jam menciita Moringa. Ankaŭ ni faris ekspozicion kun la desegnaĵoj de la infanoj.

KoNoA havas multajn planojn, ideojn kaj dezirojn fari ion por nia mondo. Por esti membro de la grupo oni devas aktive partopreni ne nur en la aranĝoj, ankaŭ en la diversaj taskoj kelfoje malfacilaj.

Konoanoj devas havi apartenan sencon al nia grupo kaj al la planedo. Jam estas interesitoj en kelkaj provincoj kiel Guantanamo kaj Pinar del Rio. Ni esperas ke vi ankaŭ volas kontribui al la zorgado de la naturo ĉar nuntempe estas gravega tasko por ĉiuj. De tio dependas nia estonteco.

Raportis: Ismary.



Konoanoj



Gravaj Datoj

OKTOBRO

Unuan Lundon: Monda Tago de Loĝmedio.

4 an: Monda Tago de bestoj.

Duan Merkredo: Internacia Tago por la malpliigo de naturaj katastrofoj.

16 an: Monda Tago de Nutrado

17 an: Monda Tago por senigo de malriĉeso.

18 an: Tago de la Medforĝanto.

NOVEMBRO

15 an: Recikligo-Tago.

DECEMBRO

11 an: Internacia Tago de la Monto.

29 an: Internacia Tago de la biodiverseco.



Kvankam morgaŭ estos la finmondo , hodiaŭ mi plantos arbojn.

Ekologia Kuirarto

La ekologia nutrado kun la tempo turniĝis en disciplino kiu resumas gravajn aspektojn de la homa laboro, kiu postulas de integra vidaĵo por atingi harmonian rilaton inter societo kaj la medio. La temo de la nutrado devas esti ne disigeble ligita al la subtenebla principo kiel vojo por la prizervado de la vivo kaj de la planed-rimedoj.

Kiel disciplino estas tre interligita al la principoj de la organika agrikulturo, la nutraĵo kaj la teknologio por elaborado de la nutraĵo. Ĝenerale plendi por iuj normoj de la efika uzado de la diverceco vegetala kiel fontoj de nutraĵoj kaj sia natura konsumado. Ĝi malproksimigas la artefaritaĵojn kaj la malrespektan manipuladon.

Aparte, ĝi prenas de la plej sanaj kaj aŭtentikaj kulinaraĵoj tradicioj por atingi propono kiu selektas la plej bonajn nutraĵojn de niaj nutraĵaj kutimoj. Ĝi stiligas kaj orientas al la konsum-maniero, kie venkas la sanon kiel afero elstara.

La Recepto:

Torto ananaso printempa.

1 ½ taso da faruno
½ taso da tritika ĝermo
½ taso da sukero
¾ taso da lakto
ananaso
60g da butero
1 ovo
1 Kulero da bakpulvoro
1 ½ taso da bruna sukero

Preparo:

Kovru la fundon de 30cm ronda muldilo per bruna sukero. Sur tiun kuŝigu ananasajn tranĉojn 1cm dikajn.

Fandu en bovlo la buteron, aldonu la lakton, la ovon, la blankan sukeron kaj batu.

Enmetu la ceteraj ingrediencoj kaj miksu.

Verŝu la miksaĵon en la muldilon, sur la ananasajn tranĉojn kaj ĝin etendu.

Kuiru la torton en moderna bakforno. Elprenu la kukon el la bakujo kaj inversigu ĝin sur la rondan pladon, tiel ke la ananaso estu videbla.



Yordán Fonseca Olivera.

Finaj vortoj

Jen la fino de tiu ĉi numero. Mi esperas ke vi legis ĝin kun intereso kaj plezuro. Mi volas kore danki al ĉiuj kiuj helpis min, speciale al Reglita kaj Geomar (ili devas scii kial). Pro esti ĝi, nia unua numero kompreneble ĝi estas plibonigebla, tial ni bezonas viajn kontribuojn, proponojn, konsilojn, kritikojn - do ne hezitu fari tion –

La venonta numero estos dediĉita al la Internacia Tago de agado pro la riveroj, la akvo kaj la vivo (14-03) kaj la Monda Tago de la Akvo (22-03) , sed vi volas sendi artikolon pri la temo. La limdato estas la 1^a de Marto, ajnatemaj kontribuoj ankaŭ estas bonvenaj.

Vi povas profiti la okazon por fari aranĝon kie vi estos, favore al la purigado de la riveroj kaj maroj de via lando.

“*Gaja Planedo*” estas por ke vi pripensu kaj ĉefe agu ion por ke via vivo ne danĝeriĝu kaj ĉiuj povas vivi en amo kaj boneco sed se vi ne kapablas fari almenaŭ respektu farantojn. KoNoA scias ke povas esti malmulte kion ni faras kaj faros por nia planedo sed ne gravas, estas ion; se unu semo pensus ke ĝi mem ne povus semi kampon , ne estos rikolto.

Ĉiuj la membroj de KoNoA deziras al vi sukcesojn en la novjaro.

Mi adiaŭas kun belaj vortoj de Robert A. Brewer, marina biologisto; mi tradukis ilin por vi kiel donaco por via menso.

Kie vi estis kiam la grandaj balenoj petis kompaton kaj la fiŝoj malaperis de niaj malpuraj riveroj?

Ĉu vi skribis leteron?

Ĉu vi kantis kanzonon?

Aŭ ĉu vi restis sidanta, dirante al vi ke via letero ne estus legita nek via kanzono aŭskultata?

Kie vi estis kiam la planedo komenciĝis morti?

Longan kaj prosperan vivon al vi, kun granda estimo:

Ismary.

Kiel sendi kontribuojn al la revuo?

Ĉiuj viaj artikoloj, ideoj, konsiloj, rimarkoj estas pli ol bonvenegaj kaj tre bezonataj.

Sendu prefere tekston originale verkitan en Esperanto se eble ankaŭ ilustritan materialon.

Se vi sendas tradukon, bv indiki la originan fonton, lingvon kaj aŭtoron.

La artikoloj ne devas esti tre longaj.

La redakcio ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.

Fotoj devas esti bonkvalitaj kiel jpg. Ne forgesu aldoni la nomon de la fotinto.

Sendu vian artikolon kiel retmesaĝon al [<ismary@esperanto.co.cu>](mailto:ismary@esperanto.co.cu).

Bv. uzi x-kodon por supersignaj literoj.

Se la fotoj estas tre grandaj (entute pli ol uno megabajto), bv uzi tiu ĉi retadreson:

[<reglap@mhnc.inf.cu>](mailto:reglap@mhnc.inf.cu)

Ankaŭ la artikolojn povas esti sendita perpoŝte al : Ismary Lezcano García .

Kuba Esperanto-Asocio.

Vista Alegre 264 e/ Juan Bruno Zayas y Luz Caballero. La Víbora. Diez de Octubre.

10500 La Habana.Cuba.



Ĝis la venonta numero.

